

Leterujo kaj Babelo en medicina terminologio
Claude Gacond, 134-a radioprelego, 1966.04.27 & 1966.04.30

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni salutas hodiaŭ kelklajn fidelajn geaŭdantojn. Sinjoro Maurice Merger en Troyes (Francio) deziras aŭdi pri la 4 svisaj naciaj lingvoj. Tiun ĉi temon pritraktos mia kolego doktoro Arthur Baur dum venonta elsendo.

A.- Sinjoro Lenard Oberj en Ŝoevde (Svedio) skribas : « *Mi aŭskultis vin, sidante en mia aŭto sur tegmenta aŭtoparkejo de la kooperativa vardomo Ŝoevde. Mi estis survoje al la restoracio por manĝi, sed kompreneble mi unue aŭskultis vin dum 8 minutoj.* »

Cl.- Ĉu ne simpatia vivsigno de fidela aŭskultanto? Se tiuj raportoj nin kortuŝas, tio estas, ke ni pensas, ke per tiaj kontaktoj kreiĝas iom post iom supernaciaj homrilatoj. Inter esperantistoj en la tuta mondo ni ofte havas pli agrablajn rilatojn, ol inter samgentanoj.

A.- Tiu sveda samideano anoncas al ni, ke la sveda esperantista kongreso okazos tiun ĉi jaron en lia urbo Ŝoevde dum Pentekosto. Ni esperas sukceson kaj atendas raporteton, por povi rakonti pri tiu manifestacio.

Cl.- La svisa esperantista kongreso okazis en Zuriko la 5 kaj 6-ajn de marto. Ĝi ĉefe estis dediĉita al societaj ludoj kaj jarkunveno de Svisa Esperanto-Societo. Ni ne povis partopreni tiun renkontiĝon, sed ni partoprenis la 19-an de marto interesan kluban kunvenon en Lausanne. Sinjoro Henri Vatré tre interese gvidis diskuton pri la *Fundamento de Esperanto* kaj malkovrigis al ni, ke nia lingvo ne estas entute entenata en tiu dokumento. Henri Vatré gvidos la 14-15-ajn de majo semajnfinan kurson en Bielo. La celo de tiu kurso estas helpi la esperantistojn sin pretigi al la trapaso de la supera diplomo. Li proponas al la aliĝontoj hejme preparotajn taskojn. Temas pri skribendaj dek-liniaj tekstoj pri tre simplaj kaj ĉiutagaj temoj, kiel ekzemple : « *Kiel vi preparus salaton el terpomoj, kiujn vi ĵus aĉetis?* » aŭ « *Kiel vi riparus biciklan pneŭmatikon, se ĝin trapikis najlo?* ». La kursanoj devos paroli. Ili ankaŭ ricevos ekzercaĵojn pri la plej malfacilaj gramatikaj eroj de nia lingvo. Sendube tiu kurso vekos intereson. Se tiel estas, Esperanto-Edukistaro de Svislando aranĝos aliajn similajn semajnfinajn kursojn, en kiuj estos ankaŭ instruataj niaj literaturo kaj historio kaj ekzercata la tradukado en la naciajn lingvojn far esperantistaj prelegistoj.

A.- Se vi ne povos partopreni tiun semajnfinojn, eble vi ferios en aŭgusto. Tiam profitu pri manifestacio proponata de sinjoro Szekely Imre en Szeged (Hungario). En lia urbo okazos la 7, 8 kaj 9-ajn de aŭgusto postkongresaj tagoj de la 51-a Universala Kongreso. Alloga programo anoncas veturojn, festludojn, hungaran folkloron, modrevuon kaj agrablajn kontaktojn. Post tiu manifestacio okazos de la 10-a ĝis la 20-a de aŭgusto Internacia Pedagogia Seminario. Tiu urbo Szeged estas la plej granda kulturcentro en Sud-Hungario. Ni ankaŭ atendas raporteton por povi rakonti pri tiuj du manifestacioj.

Cl.- Sinjoro Ivica Šponar, kiu aŭskultis nian respondon al sia letero kun siaj edzino kaj dujara filineto, ŝatus foje aŭdi raporti pri la temo superkonfesia internacia biblio-servo. Tion mi volonte faros post kontakto kun svisoj, kiuj kunlaboras al tiu agado.

A.- En la gazeto *Information Unesco* ni trovas raporton pri temo, kiu povus vin interesi. Ĝi titoliĝas *Babelo en la medicina terminologio*.

Cl.- Ĝi rakontas, ke internacia centro pri dokumentado por la medicinaj terminologio kaj leksikografio estas kreota sub la aŭspicio de la Konsilantaro de la internaciaj organizaĵoj por medicinaj sciencoj (C.I.O.M.S.). Tiu decido estis akceptita de la oficejo de tiu organizaĵo post rekomendo farita de internacia grupo de fakuloj, kiu kunsidis en novembro en la Domo de

Leterujo kaj Babelo en medicina terminologio
Claude Gacond, 134-a radioprelego, 1966.04.27 & 1966.04.30

Unesko en Parizo. La Monda Organizaĵo pri Sano kaj Unesko estis reprezentitaj en tiu kunsido.

A.- En sia raporto la fakularo insistas pri la konfuzo reganta en medicina terminologio, konfuzo el kie povas aperi miskomprenoj foje danĝeraj por la publiko. Ekzemple pli ol 30 terminoj estas uzataj por signi la fibrozon de la osta medolo, kaj multaj afekcioj estas priskribitaj en la sama lingvo sub 10 malsimilaj nomoj. En tiuj kondiĉoj la scienculoj ne povas esti certaj, ke ili parolas pri la sama aĵo kaj la interŝanĝoj fariĝas pli kaj pli malfacilaj.

Cl.- Kiel ekzemplon la fakularo citis la terminon *eta doloro*, kiu en Usono estas uzata de iuj neŭrologoj por priskribi 3 procentojn el ĉiuj eblaj epilepsiaj krizoj, dum en Germanio, tiu sama termino estas uzata por priskribi 80 procentojn el ili. Tiu konfuzo ne nur povas klarigi la kontraŭajn rezultatojn konstatitajn je la uzo de antiepilepsiaj medikamentoj, sed ankoraŭ reprezentas danĝeron, ĉar la uzo de kuracilo povas mildigi iujn epilepsiajn formojn kaj pligravigi aliajn.

A.- La fakuloj ankaŭ substrekas, ke la nombro de la esploristoj ege pliiĝis la lastajn jarojn kaj paralele la nombro de la malkovroj. Tiu **eksplodo** de la medicina informado estos necese akompanata de **eksplodo** de la terminologio, se pluraj terminoj estas uzataj en unu sama lingvo por signi unu saman koncepton.

Cl.- Tiu centro pri dokumentado ricevos ĉefan taskon kuraĝigi la medicinajn societojn studi la problemojn de la medicina lingvo kaj ĝin senbalastigi de la nenecesaj vortoj kaj adoptigi terminojn kaj difinojn akcepteblajn internaci-skale. Tiu centro kuraĝigos ankaŭ la sciencajn kompetentajn organizaĵojn elverki medicinajn vortarojn kaj provos faciligi ilian eldonon kaj disvendon. La centro laboros en la kvin uzataj lingvoj en medicino : la germana, angla, hispana, franca kaj rusa.

A.- Tiuj eldonoj certe helpas la esperantistajn medicinistojn fiksi la esperantan medicinan terminologion.

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislandon. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-